

LEONTODO

1970. APR

N-ro 41

ORGANO DE Hokkajda Esperanto-Ligo

第34回北海道エスペラント大会

— 7月11～12日 洞爺湖にて —

前大会(函館)での決定により今年の大会準備は室蘭ESP. 会にまかされました。一応の日程、場所は次のようになっています。次号では更にくわしく御知らせします。

とき 7月11～12日(土、日曜)

ところ 洞爺湖温泉 グランド洞爺

忘れずに皆さんの夏の予定に入れておいて下さい。そうそう、それから万博迄足をのばすつもりの方は、7月25～26日、万博のすぐとなり、高槻市で開く第57回日本エスペラント大会をお忘れなく。

エスペラント義務教育等入請願案(S-ro 洲田提案)について

P3の(1)は洲田氏の提案、(2)のKartoによって各地方会HEL各報に伝えるところ、(3)の意見がS-ro Salajaから寄せられた。日本ESP. 運動の歴史にも、1928年の日本大会で同様の決議が行われている。 [この件3頁以降参照]

Samideanoj agas ---- (各地ニュース)

道内のESP. MOVADOは、依然変りばえのない、一口にいえば沈滞しているといえる。たゞ札幌の学生グループが昨年末以来活潑になり、語学的にもESP.運動への取組みにも意欲をみせているのが希望をたせる。

☆ 北海道教育大札幌分校： 教育大三沢助教授は69年5月以来研究室で講習会を始めた。tekstoloには大島義夫のNovel Kursoを使用、毎週2回朝8時からという例のない早朝の集い。4名が1名も欠けず半年学びつづけたため札幌ESP.会に入会、Sabata kunsidoに出席している。

☆ 札幌ESP.会： 昨年なくなった伊東三郎が口ぐせのように「ESP.運動の“時代”からの遊離」を警告していたが、ESPERANTOは概して入の出入りも少なく、マンネリ化の傾向があった。S.E.S.は最近いくらかの改革にのりだした。

1) 連絡事務局開設：日常活動化連絡円滑化のためにFino ^{（前）}に。但し Sabata Kunsido は従来通り ターピスト学院。

061-31 札幌市上篠路町上篠路109-131 嶺正子 方

2) Sabata Kunsido

▲8時から Parkerado, Verloĉeno, Librolego (現在 Forto de l' vero), 19時から Interparolo, kanto, ludo aŭ laboro de S.E.S.

3) Dimanĉa kunsido: 毎月1日曜日 Esp. Movado について Kunsido と同く。

4) Kelkaj studentaj esp-istoj en Sapporo havis diskutojn por diskuti kiel disvastigi e-on inter studentoj. (al p.)

(1) Propono de S-ro T. Fucita al H.E.L.

Karaj Samideanoj,

Mi kredas kun gojo, ke vi havis bonan novjaron esperplenan. Ĉu tiu '70 jaro farigus tre grava epoko por ni nomaro. Vivante en tia epoko ni esperantistoj ankaŭ pagu nian tutan forton por nia sankta celo-- havigi unu solan komunan oficialan lingvon al homaro sur la tero -- nun estas la ĝusta tempo realigi ĝin, ĉu ne? Do ni unuenime kaj energie antaŭen puŝu nian movadon pli efike okaze de la Lacia kongreso en Takacuki, mi kore deziras. Pro tio mi intencas fari ian rezolucion por peti al la registaro, ke ĝi enkonduku esperanton en komunan edukon plej frue.

Ĉu vi volus konsenti kune proponi al la kongreso kun ni?

Atendante vian respondon,
samideane via
Taori Fucita (Subskribo)

Societo Esperanta de Mondfederalistoj (SEMO)

(2) Karto de H.E.L. al la komitatanoj kaj lokoaj grupoj

Tomakomai, 31/Jan/'70

Kara samidean(in)o,

S-ro Taori Fucita en Tokio proponas fari ian rezolucion okaze de ĉijara Japana Kongreso por peti la registaron, ke ĝi enkonduku esp-on en komunan edukadon.

---Mi skribis al li: "HEL konsentas principe. Tamen ni ne havu iluzion, ke tia peto facile realiĝos, ĉar sen konkreta kaj nerefutebla fakto tia peto malofte sukcesas. Plej grave estas ĉiam laboradi por informadi kaj konvinki la publikon pri la utileco de Esp. ---"

Se vi havas ian opinion, bonvolu skribi al mi. Tio estas bona temo pri la maniero de nia movado. ---

(3) VAPORO EN LA KAPO

SANAJA Juiĉi (Sapporo Esp. Soc.)

Ĉi tie mi prezentas fantaziajn impresojn por nia movado. Verdire, ĉu pro troa trinko de viskio antaŭ enlitigo, mi ne scias, tamen multaj batatelaj konceptoj kaj iluziaj ideoj ekaperas en la ekzaltitan kapon unu

post alia kaj malhelpas min dormi. Mi skribas nur por mia sano. Mi tute konsentas la opinion de S-ano Hoŝida pri la propono de S-ro T. Fuĉita. (Tamen laŭ mia tro kruda, sango-plena, aŭdaca opinio, ni devas fari ne rezolucion sed revolucion.) Jes, la plej grava estas nia ĉiutaga laboro! Kaj la problemoj pri tio estas tre akre seriozaj por ni ĉiuj.

Ankaŭ E-o havas rajton ekzisti, kiam ĝia neceseco estas postulata, kaj fakte ĝi maskigis en tia historia fono. Sed E-o estas nenio pli ol nur lingvo, ilo per kiu oni povas interkomuniki pensojn, opiniojn, volojn, sentojn kaj informojn. Oni povas uzi E-on por ĉia celo, por paco, eĉ por milito. En tiu senco E-o ludas rolon similan al tiu de moderna scienco en la homa socio, ekzemple, kiel la fruktoj de scienco estas utiligitaj ankaŭ por nukleaj, kemiaj aŭ biologiaj armiloj, dume ili subtenas nuntempan produkton. Ni devas rekoni ĉi tiun punkton.

La vorto "internacia lingvo" havas brilan allogan signifon en nuntempo de infermo kaj kontakto. Kaj kvankam angla lingvo superregas kaj estas kredata absoluta, ĉio-pova en nia lando, tamen ne malmultaj homoj subtenas principe E-on kiel internacian lingvon. Per reala praktiko, t.e. uzi E-on kiel efikan instrumenton de komuniko, ni devas pretendi la ekziston kaj utilecon de E-o publike. Internacia korespondo, aŭ legi E-librojn, gazetojn eldonitajn eksterlande, por kompreni fremdajn kulturojn en popol-amasa kaj individua stadio estas populara kaj familiara utiligo de E-o. Ne nur en tia privata, individua flanko, E-o povas esti efike utiligita ankaŭ por doni kontribuon al la socio, kaj tiaj brilaj laboroj troviĝas en la historio de nia movado, ekz. la japana traduko de vjetnama novelo "Franjo TU HAU" el E-o, farita de s-anoj Oka kaj Hoŝida. Ankaŭ laboroj en ĉi tiu flanko estas notindaj. Plue, laŭ la "abdukcio" (=maniero ekpenŝi ideon) de S-ro Kangurao --vidu la interesan verkon ironi-plenan "Kiel (mal)venkigi Esperanton" -- oni povas diri, ke ni formu traduk-grupojn kaj faru tradukan laboron por prezenti ĉion, kulturojn, pensojn, literaturojn ekster- kaj enlandajn. E-o estos certe rimarkita, se revuoj sur la monataj gazetoj unua-klasaj ekz. "SEKAI", "TENBŌ" aŭ "CHUOKORON" k.a.,

estas tradukitaj en E-on por prezenti japanajn pensojn kaj opiniojn en la tutan mondon, ĉar kurantaj pensoj eksterlandaj, precipe usonaj kaj eŭropaj, estas abunde reprezentitaj en japanion, sed la renversa kazo estas ekstreme malofta. Aŭ ĉu ni traktu nuntempan japanan literaturon, verkojn de Ohe Kenzaburo, Inoue Mituharu aŭ Misima Yukio k.c. --? Por epligi tian aferon unue necesos kondiĉo ke E-ajoj estas traktataj kiel valoraj komercaĵoj, kaj ni devas fari tian situacion. E-a movado estas memstara, kiam oni povas gajni monon kaj subteni vivon per laboroj koncernaj al E-o, kaj tiam E-o estos reala lingvo.

Ĉu E-movado vere allogas junulojn kompare kun aliaj aferoj? Ekzistas certaj multaj organizoj kiuj posedas kronon "xx Esp. Societo", k.s., sed ofte troviĝas ne malmultaj nur nominalaj kiuj ne bone formiĝas kiel "organizo", kaj bedaŭrinde tio povas esti ĝenerale vera situacio de nia movado, spite al kelkaj esceptoj. Tia situacio probable seniluzios ne malmultajn homojn, kiuj havas favoron al E-o, ni timas. Organiza agado konsistas ĉefe en la du flankoj: unu estas okazigi regulan kunvenon, kurson, ekspozicion publike k.t.p. La alia estas informa agado, e.z., eldoni informilojn, gazetojn, librojn kaj lastatepe ankaŭ ĉi tiu flanko ekokupas gravan pozicion ne ignoreblan por ĉiu-taga agado. Oni pesas valoron kaj decidus ĉu partopreni en E-movado. E-movado devas enhavi valoron por ni. Kiom ajn da ripeto de "ABC" kreas nenion. Kaj eĉ kiom ni diras ke E-o havas eblecon, estontecan mirindan, aŭ eĉ kiom ni kredas la idealon, tio estas vana sensencaĵo, se ni ne klopodas, laboras por realigi, progresigi la movadon.

Tiu, kiu sin mem nomas "E-isto", devas legi almenaŭ librojn, gazetojn enhav-ricajn kaj strebi skribi esprimi sian penson, vivon, senton aŭ praktiki en sia laboro kaj vivo. Certe tempo necesos por E-iston memstaran. Kvankam nombro estas ne ĉiam absoluta, sed ankoraŭ unu el efektivaĵoj barometroj, kiuj montras la staton de la movado. Ni ĉiam devas disvastigi E-on inter juna generacio kaj kreskigi laborantojn aktivajn. Tio estas ja ĝenerala principo de ĉiu organizo por progresi en estonto. Juna forto povas ludi la avangardan rolon ankaŭ en E-movado. Por efike antaŭen puŝi la movadon, ni devas konsideri la

gravan problemon pri organizo --- ĝisfunde, tutlande ---
Cu ni ne planu kaj laboru multigi membrojn de HEL, ĉkz.
pli ol 1,000 en ĉi tiuj 5 aŭ 10 jaroj, kiuj praktikas
en diversaj regionoj? Ĉiuokaze, simplan Reproduktadon
for!

~~~~~

## MIA IDEO PRI ESPLORADO

Kenji Sekio (Sapporo Esp. Soc.)

§Kial oni esploras?

iri por serĉi nekonatecon

La historio de la homaro kondukas nin; rigardu la  
agadojn kiujn pioniroj faris. Malorj, kiu mortis sur-  
voje de supreniri sur la Evereston, kies supron neniu  
ankoraŭ surpaŝis, kaj Hidejo Noguĉi, en lia kazo,  
studante la flava-febron, mortis. Same Mageran. Li  
deziris montri sin sub la dredo "La tero estas rondo!"  
Tiu ĉi tri homoj jam mortis nestinginte la iliajn celojn,  
sed mi pensas ke la mortoj ne estis vanaj. Evidente,  
post ĉio, ili grandege kontribuis por progreso de la  
homaro. Estas ankaŭ fakto de Zamenhof kreis esperanton  
por direktigi al la ideala mondo. Kompreneble, Malorj  
kompletigus sian ideon tuj kiam li sterus forte sur la  
supro de Everesto. Kaj ni ne dubas, ke ankaŭ solvi  
flava-febron devis esti la fina figuro de ideo de  
Hidejo Noguĉi en lia vivo. Tia spirito estas komuna  
ne nur al la esplorado kaj montogrimpado, sed ankaŭ  
al diversaj movadoj de homoj. Kaj ĝi daŭrigas resti por  
ĉiam tiel longe, kiel la homaro ekzistas sur la tero.  
Eĉ bestoj devas serĉi nutraĵojn dum la malsata tempo  
por vivi. Estas sendube necese koni eksteran mondon por  
vivi. Tiu ĉi fakto estas egala ambaŭ al besto kaj al  
homo. Bestoj ordinare movas sin laŭ siaj instinktoj nur  
por manĝi. En kazo de la homo, kiu liberigis de la  
instinkto kaj havas intelektan funkcion, apartigas du  
konojn: unu estas por manĝi kiel besto, la alia estas  
tia, ke ni rigardu ĉion kaj spertu ĉiamaniere. En niaj  
ludoj, kiujn ni spertis en la infaneco, ĝi estas  
precipe klara. Ĉiu persono ekde la naskigtempo havas  
avidon, ke li volas koni aŭ serĉi pli. Kelkaj nomas,

ke tio estas la plej fundamenta esenco de la homo kiu estas sub la sorto vivi. Post la malnova feŭdismo, kiam la revolucio de civitana socio liberigis la nomon, ankaŭ la esenco de la homo, nome la scivolemo, liberigis. Ekzemple, la natura scienco prosperis aŭ la 'jarcento de eltrovoj' komenciĝis.

### kreema spirito

En la nuna tempo oni diras, ke la esplora agado estas tre intelekta entrepreno. Esplora plano estas planata de tiu, kiu neelteneble deziras enketi kaj sperti ion en la nekonata regiono. Ĝenerale, la planinto sola aŭ organize, iras explore nekonatan lokon por solvi ian problemon kaj tra sia agado li kontentigas sian intelektan scivolenon. En ĉiu kazo, esploro kiu agadas ĉe tiu loko, eknovas kaj eksentas plenan senton, en kiu estas la harmonio de spirito kaj korpo. La esplora agado, do, sentigas tut-personecan vivindecon kaj rekonigas sian ekziston al la esploro. Mi bazas la esploron sur la libera spirito. Tio estas, en tiu ĉi vidpunkto, simila al la kreema agado de ĉiu persono. Ni, do, bezonas enketi la econ de tiu kreema agado. Ĝi certe estas en ĉiu kampo, kiel arto, scienco, politiko, k.c.

Ekzemple, la agado de sciencisto estas komponata de du interesoj. Unu estas la intereso siatempa, la alia estas la intereso de li mem. Multaj sciencaj teorioj, laŭ bezonoj kiujn tiutempanoj postulas, estas produktata de tiuj, kiuj funkcias la imagpovojn per ĉiuj fortoj. Kiel gojplena, aliflanke, la serĉoro de li mem estas! Ĉio kio donas gojan kaj aventuran senton al ĉiu sciencisto, kiel Njuton, Keplar, Faradj, k.a., situas en la mezo de la agado nomata 'KREO'.

Mi ofte aŭdas, ke la vivo estas simila kiel vago al nekonateco. Oni, en tiu vagado, trovas ĉiun veron kaj kreas sian ideon. Tio ĉi estas mia respondo al vi por la demando 'Kiel oni esploras?'

### ŝokulo rigardante kulturon

#### diverseco de la kulturo

Sekvanta temo estas okulo kiu rigardas la kulturon. La kialo, kiun mi montras, estas ke la pozo de mia agado havas tendencon rigardi la kulturon. La kulturo,

kiun mi parolas, ja montras la tutan vivadan formon de socio. Ĝi ne montras tiun, kiu estas altgrada aŭ altteknika, sed montras agaderon de la homo -- ekzemple lavi teleron, kurigi biciklon, k.s. Ĉiuj personoj, do, havas kulturojn. Ni pripensu en pli vasta sfero, kaj ĉiuj el vivajoj havas siajn proprajn mondojn. Kiel brave aŭ perfekte plenumas la besto, insekto aŭ planto sub kondiĉoj de la naturo donata al ĝi!

Rigardante tiujn kulturojn en la ĉirkaŭaĵo diferenca ol la nuna, mi trovas novan memon kaj komencas havi novan problemon al mi. Ankaŭ ĉiuj esplorantoj, tiamaniere, ekjetas al ni la problemojn, kiujn la nuna socio enhavas. La esploranto devas kompreni aliajn kulturojn pli bone, ol ordinaraj vojaĝantoj. En tiu kazo, ili bezonas havi elastajn pensokapablojn kaj rigardi ĉiujn el vestvidpunkto. Ni ja havas tendencon rigardi ĉiun kun la valorkoncepto de nia propra mondo, nia antaŭkoncepto aŭ antaŭjuĝo. Por ni, estas malfacile forigi la memcentrismon. Ambaŭ usonano kaj anglo pensas ke li ja estas reprezentanto de la civilizo. Se li, el tiu vidpunkto, rigardus eskimon aŭ buŝmanon, la raso estus kruela barbaro ekde lia unua vido. Sed ankaŭ la raso povus pensi ke usonano estas kruela ulo. Por koni sin mem pli, oni bezonas sperti sinperdon en la diferenca cirkonstanco. Mi dubas, ĉu la komuna valor-koncepto de la homaro ekzistas.

### la vojo ĝis la interkompreno

La temo pri kio sekvante mi pensas, estas 'kiamaniere ĉiun kulturon ni komprenu'. Por tio, ni havas jen la scienceman rimedon kiel kultur-antropologion, sociologion, jen la literatureman aŭ arteman. Ĉiu rimedo estas bona. Krom ĉi tio, mi volas emfazi sekvantan.

Ni, ekde la juneco, estas instruata ke la egala rajto ekzistas inter virino kaj viro, aŭ ke ĉiuj personoj estas egalaj trans la diferencoj de la haŭtaj koloroj. Sed ĝi estas nure sensenca homismo. Certe, aŭ virino aŭ viro reale ekzistas. Aŭ la nigra homo, la blanka, aŭ la flava kiel ni, ekzistas. Kaj homrilato kaj homgrupo estas komponataj sur la realo. Malica maniero estas tia, ke ignorante la supran fakton oni metas problemon pri la homo ĝenerala kaj persvadas la solidarecon. Mi, antaŭ ĉio, prenas punkton de la real-konado. Realo inter samseksuloj tre diferencas ol tio



inter aliseksuloj, eĉ se oni krias ke ni komprenu tra la reciproka koro. Ankaŭ pri la internacia paco, la solidareco, ni povas same diri. Ekzemple, la nigra homo devas diri sian opinion el pozicio de la nigra. Japaniano diras kiel japanulo. La realo estas ka estimate la pozicion unu la alian, ni devas unuigi sur nia respektiva memkonscio.

Por ĉiu okazo, ni ne estas permesitaj uzi vortojn malorde. Mi kredas ke la interkompreno komencigas de la realkonado. Mia esplorado ĉiufoje estas komencata el tiu ĉi pensado.

§ tri etapoj de la disvolvado de la regiono

Fine, mi simple montras la konturon de tiu ĉi temo, ĉar la esploro, jam de longe, profunde rilatas kun la disvolvado de la regiono.

1, a. klasika esploro

serĉi nekonsatan teron, genton, vivaĵon.  
sed nuntempe tiuj preskaŭ ne trovigas.

b. moderna informa-esploro

observi ĉion kaj kolekti informojn --  
malgravajn aŭ bagatelajn.  
rigardi eĉ la plantojn, meteoron, en tiaj  
lokoj, eĉ se vi estas psikologulo.

El tio rezultigas vojaĝfrazaro, meto de la problemo.

2, sinteza-enketo post detale inspekti la informojn kolektitajn ĉe I.

c. fari hipotezon

ĉ. decidi rimedon de la enketo aŭ eksperimento

d. studi kun titoloj la tian problemon kaj sur la pozo, solvigi

El tio rezultigas la enketo-raporto, nova meto de la problemo, vojaĝfrazaro.

3, praktikado de disvolvi la regionon, solvi la problemon, post inspekti la rezultatojn de I,2. Intelektu studado per literaturo estas necesa komune ĉe I,2,3.

Precipe min, plej interesas b-o. S-ro Jiroo Kaŝakita nomas la rimedon 'eksterscienca' en sia verko 'esploro de la ebleco'. Tio estas ni pensu kaj rigardu laŭeble plej diversaj flankoj. Nome, la elasta pozokaj la larĝa koro, kun kiuj ni aŭskultu ĉiujn. Mi pensas ke la

ĝisnuna scienco-rimedo gravigintas 2-an, tamen la I-a etapo de la scienco ja solvas la nehomn situacion kiu la nuntempa socio havas.

La nuna scienco havas tendencon pruvi ĉian fenomenon analize. Oni inklinas ankaŭ uzi fragmente sciencan teknikon aŭ rimedon. Sed nur la maniero ne estas konvena almenaŭ en la reala situacio. La reala situacio estas komponata de ĉiu kompleksa fenomeno. Ni devas firme rigardi tiujn kompleksajn fenomenojn. Ekzemple, pri la publika difekto. Por prosperi, multaj fabrikoj estas konstruataj, aŭ por forigi damaĝinsektojn, la agrikultura medikamentoj de hidrargo estas uzata sen konsidero pri rezultatoj de tiu. Nia socio, do, nun staras en la kriza situacio al kiu tute mankas la harmonio.

Kvankam tiel nomata potencaj ŝtatoj nun estas subtenantaj kun grandkvanto da kapitalo por la disvolvadoj kaj helpoj de nepotencaj ŝtatoj kiel aziaj aŭ afrikaj, tamen, tio ne estas trafa maniero. Ĉar la nepotencaj ŝtatoj, malgraŭ tio, havas diversajn kontraŭdirojn kiuj okazas pro altrudo de valorkoncepto de la potencaj ŝtatoj. Trafa maniero devas esti praktikata laŭ la homeco en la regiono. Se ne, en diversaj kampoj -- ekzemple, edukado, religio k.ĉ. -- la kontraŭ dirojn okazigos. Ĉiu regiono havas sian karakterizaĵon, kiel ĉiu persono havas sian personecon.

Mi estis provonta esplori puŝto-nomadon en afganio ĝis antaŭ nelonge. Mi ĉiam pensis pri tiu esploro, ke mi vivados kaj agados kun nomadoj dum 2 jaroj en la lando. Sed mia kompetenteco 'studerto', post ĉio, rezignigis min esplori en la lasta pasinta somero. Mi intencis iel okupiĝi en la hejmofikso en seka terzono estonte, post pripensi en la esplorado la humanismon aŭ la individualismon.

Kompreneble, la sopiro al la homeco de la nomada homo allogis min, kvazaŭ romantiko al la nekonateco.

(Parolado ĉe Zamenhofa Festo, 14. Dec. 1969)

(de p. 2) La kunkludo estas, ke nuntempe estas malfacile agi sendepende en ĉiuj universitatoj pro malmulto de la membroj, tial ni agu kunlabore por varbi novajn membrojn en la nova lerno-sezono kaj preparu afiŝojn, flugfoliojn k.a. je la nomo de "Federacio de Esperantistoj Studentaj en Sapporo." Nun ili planas distribui flugfoliojn ĉ. 6000 en keikaj univ.-oj kaj kolegioj, kaj ili petas helpon por financa bazo.

## KASRAPORTO DE H.E.L.

前回報告の残高① 105,135<sup>円</sup>  
 内 苫小牧 9,451<sup>円</sup>  
 小樽 15,684 (振替)  
 " 80,000 (定期)

[収入]  
 会費 32名分 9,600<sup>円</sup>  
 (札幌ESP.会 '69年分): 松岡耕二、  
 黒川志美子、佐々木輝子、長田敏雄、  
 後藤良一、後藤牧人、山崎吟、佐々木健  
 児玉玄夫、今村多代子、嶺正子、東三郎、  
 アリマヨシハル、木村喜正、藤井聖雄、  
 渡辺桂子、那須博文、ゴトヨシハル、  
 杉山純次  
 (小樽 Esp. Asocieto '70年分)  
 Ges-roj 山賀、早川、鶴分、小泉、  
 江口、イノグロ、渡辺、伊藤、武田、  
 (札幌 '70年分) 小林正明、  
 相沢治雄、山岸悦子

[支出]  
 振替貯金払込料 35<sup>円</sup>  
 LEONTODO N-ro 40 印刷費 500  
 " " " (表紙) 800  
 " " 孔版用紙2包 1600  
 封筒 150枚 540  
 LEONTODO N-ro 40 郵送 3290  
 郵便料金 200  
 タイフ原紙 2枚 50

収入計 ② 9,600<sup>円</sup>      支出 ③ 7,015<sup>円</sup>

1970年3月末現在残高 ① + ② - ③ = 107,720<sup>円</sup>

内訳 { 小樽振替 25,249  
 " 定期 80,000  
 苫小牧郵貯 2,471

Informeroj de tiu kaj ĉi tiu -----  
 eksf-ino(出)陽子(元首) 3月6日、目黒ESP.会幹事S-ro田中滋と結婚  
 S-ro 佐藤晃一(小樽) 4月、虻田商業高校教頭に就任された。

S-ro 村島幸子(吉) 帯広へ。(4月) Sia edzo laboras en 帯広柏葉高.

S-ro 杉山純次(礼) 4月始め、結婚されました。

F-mo 渡辺程子(礼) Edzinigōs en majō. Gratulon! 東京世田谷区へ。

S-ro 川口真志(礼) 4月の転勤で東京へ。長い間 御苦労さまでした。

さっそく TEJA 5月合宿の講師としてはりまっています。

### あとがき

春は移動の季節。転勤 転居など多くの gesamideanoj が続いた。新しい土地での御活躍を祈ります。全国的には、昨年 JEI 主催の TEJA (東京青島 ESP 連合) の春の一せい講習会、3月から4月にかけて開催中、4月2日現在受講生150名とのこと。KLEG (関西 ESP 連盟) に始まり、昨年九州でも行われた一せい講習会、いよいよ東京で。北海道はまたそのより後体列の多いけれど、講習会同ホスター、まさひろなどの準備ぐらい、HEL の手で準備してはどうかと思ひますが

## ENHAVO DE ĈI TIU NUMERO

|                                                        |               |
|--------------------------------------------------------|---------------|
| 第34回北海道エスペラント大会                                        | 1             |
| エスペラント義務教育導入請願案について                                    |               |
| Gesamideanoj agas                                      | 2             |
| (1) Propono de S-ro T. Fucita al H.E.L.                | 3             |
| (2) Karlo de H.E.L. al la komitatanoj kaj lokaj grupoj |               |
| (3) VAPORO EN LA KAPU                                  | SAŬAJA JUĴCI  |
| Mia ideo pri Esplorado                                 | Kenji Sekio 6 |
| Kasraporto de H.E.L.: Informeroj                       | 11            |

あとがき ENHAVO

12

## LEONTODO

N-ro 41.

発行 : 1970年4月

北海道エスペラント連盟 : 047小樽市花園3-8-13 山賀眼科内

編集発行 : 苫小牧事務局 : 053苫小牧市王子西部3区94号